

Enhavo

- **anoncoj**

Nomumu kandidatojn por 2017; Book collection free to a good home; Forpasoj; Korespondi deziras; *Epitomo*; *Legacy of the Elder*; Novaj varoj en la retbutiko; Recenzu librojn por *Usona Esperantisto*

- **Media hits**

anoncoj

Noteworthy mentions of Esperanto in American media

- **loke**

Zamenhofa festo en Fort Worth; Internacia Festivalo en Raleigh, Norda Karolino

- **de la estraro**

Raportoj de la direktoroj kaj aliaj estraranoj de Esperanto-USA.

- **Lud-krokodilo**

la amatora lignaĵisto - Daĉjo Rutan

Aparte taŭga ludilo por juna (aŭ ne tiel juna) esperantisto.

- **La sindefenda pafinto**

enigmoj - Daĉjo Rutan

Surplanke kuŝis la kadavro de Jozeĉjo Cikatro, fifama gangstero. Sur la sanganta kapo de Jozeĉjo troviĝis du novaj truoj.

- **Festaj kant(aĉ)oj**

ŝercoj - Simono Keith

Simono kaj Liĉjo "plibonigas" festokanton.



Nomumu kandidatojn por 2017

Mi, Ron GLOSSOP, Jordan KALILICH, Dominique LAFLAMME, kaj Julie SCHWARTZ estis elektitaj de la Prezidanto de Esperanto-USA kiel membroj de la Elekto-komisiono por 2017.



Laŭ Bill HARRIS, estro de la Centra Oficejo, ni devas nomumi kandidatojn por la oficoj de Prezidanto, Vic-prezidanto, kaj tri por la oficoj de Direktoroj.

La limdato por nomumo estas la 1-a de Marto. Cetere, grupoj de kvin membroj de E-USA povas nomumi kandidaton por ofico ĝis la 15-a de Februaro. Pro tiuj ĉi limdatoj, ni devas informi membrojn kiel kontakti nin por iliaj nomumadoj, kaj ni devas kontakti verŝajnajn kandidatojn pri kandidatiĝo.

Nature estus bone nomumi almenaŭ du aŭ pli kandidatojn por Prezidanto kaj Vic-prezidanto. Mi ankaŭ ŝatus ke ni nomumu kvar ĝis ses kandidatojn por Direktoroj. Mi jam parolis kun kelkaj eblaj kandidatoj en la Nord-Teksasa regiono kaj demandis, ĉu ili interesiĝas pri kandidatiĝo. Mi informos vin poste pri iliaj respondoj. Ili estis la malalte pendantaj fruktoj. Bonvolu fari la samon en viaj regionoj. Mi anticipas ke ni ne trovos sufiĉe da kandidatoj dum tiu ĉi unua paŝo kaj ke ni devos serĉi aliajn.

Vi povas kontakti min ĉe la suba retpoŝtadreso. Mi estas atingebla ankaŭ ĉe mia hejma telefona numero 903-893-0501 kaj ĉe mia poŝtelefona numero 903-819-4416. Mi kutime ricevas tekstmesaĝojn sur la poŝtelefono.

— Fred MEYER, III
<f3meyer@texoma.net>

Book collection free to a good home

I may be moving into a retirement home in the next few months.

I have accumulated quite a large collection of books

in and about Esperanto. Many were purchased from eBay and are quite old. I would like to donate them but I can't afford to ship them. So, someone would have to come to my home here in Mesa AZ to pack them and pick them up.

I can take a short video to show if anyone is interested.

— Bil MUNSIL
<wmunsil@cox.net>

Forpasoj

Ni funebras kaj kondolencas pri la forpasoj de la jenaj membroj:

- Sylvan ZAFT forpasis la 30-an de Julio, 2015 en Miĉigano. Li havis 80 jarojn. Jen nekrologo [<https://goo.gl/czetSF>] (anglalingva).
- Frans JAHGER forpasis la 30-an de Septembro 2016 en Victoria, Teksaso. Li havis 93 jarojn. Jen nekrologo [<https://goo.gl/mLRGTN>] (anglalingva).

Korespondi deziras

Saluton estontaj amikoj! Mia nomo estas Mikaelo. Mi havas dudek ses jarojn, kaj mi komencis lerni Esperanton antaŭ unu monato. Ĝi amuzas min. Krom lingvoj, mi estas pasia pri verkado, sciencfikcio kaj fantazio, filozofio, arto, muziko, kaj teknologio. Mi deziras interparoli pri libroj, kino, veturado, eĉ religio. Mi estas senantaŭjuĝa kaj mi ŝatus interŝanĝi vivrakontojn aŭ nur paroli pri la vetero.



Mikael FRUTIN 978588, Cooper Street Correctional Facility, 3100 Cooper St., Jackson MI 49201

Mi estas de Kubo, kaj mia celo estas renkonti amikojn de Usono por amikeco kaj ricevi leterojn de esperantistoj. De la jaro 2013 mi havas duan nivelon de Esperanto de la Esperanto-Asocio de Kubo.

**Ernesto ALILA, san lazaro #465
perseverancia y campanario, piso-3 centro
Habana,10200, La Habana Kubo – Cuba.
<elektronica-ernesto76@nauta.cu>**

Epitomo

Member Hiram Crespo mentions that he has recently published *Epitomo*, an Esperanto translation of the original founding documents of the Epicurean school of philosophy. He also includes his own reasonings on the scrolls of Philodemus from Herculaneum, a villa that survived the eruption of Mt Vesuvius in the year 79. He describes the book as a humanist philosophy of happiness and a way to get people to engage their critical thinking skills in Esperanto.




The book can be previewed on Amazon using the link below.

Epitomo [<http://amazon.com/dp/1537679473>]
Hiram Crespo 180 pages. CreateSpace, 2016. ISBN 1537679473.

Legacy of the Elder

The undead of American cinema seem to have a inexplicable taste for the international language — as witnessed in films like *Incubus* and *Blade Trinity*. Thanks to one of our members for alerting us that Esperanto has now spread to vampire novels, too.



Fiera's life had never been easy.
Some days, just staying alive could be tough. So

when vampires came to rescue her from prison, things should have started looking up.

Thus begins the cover blurb for *Legacy of the Elder* (2015). While written in English, Esperanto features prominently throughout this vampire story. Fiera, the main character (who shares a name with the pseudonymous author) even begins her narration in Esperanto:

Se vi povas legi ĉi tion, vi eble posedas la genon, kiu ebligas onin vampiriĝi. Mia nomo estas Fiera. Mi estas vampirino, kaj ĉi tio estas mia rakonto.

A brief introduction to the language appears at the end of the book, and Esperanto-USA is even mentioned in the story line. *Legacy of the Elder* is available in paper and ebook format from AuthorHouse, Barnes and Noble, and Amazon, where the first six chapters can be sampled for free online.

Legacy of the Elder [<http://amazon.com/dp/1496962990>]
Fiera
354 pages. AuthorHouse, 2015. ISBN 1496962990.

Novaj varoj en la retbutiko

- **BOOK CATALOG - 2017**
Catalog of all books and CDs available in the online store. Useful for those who do not have regular access to the Internet, or those who simply prefer to browse the catalog on paper. 58 pages. 2017. \$7.00. Link [<http://bit.ly/2izVs1d>].



- **WHY DOES AN AMERICAN USE ESPERANTO?**

Joel BROZOVSKY. Joel is an American who has used Esperanto all over the world. His reasons for using the language should strike a chord with all American Esperantists. Pamphlet (downloadable PDF). Free to members. Link [<http://bit.ly/2izZ8zZ>].

• SHORT FILMS FOR CHILDREN AND BEGINNERS

Nicole Else in Australia has produced over 100 short films in Esperanto. The subtitles are written and spoken in Esperanto. The Esperanto pronunciation is very good (not perfect), and many of the stories are interesting for adults as well as children. Free download. Link [<http://bit.ly/2iA2O4q>].

Mendu de *Esperanto-USA*, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, aŭ rete [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

Recenzu librojn por *Usona*

de la estraro

Ĉiunumere mi petos la estraranojn iomete verki por sciigi al vi, kion ili lastatempe faris. Ili mem decidas kiel plej bone fari tion: ĉu raporti pri agadoj, ĉu proponi aŭ diskuti ideojn, ĉu instigi membrojn al kunlaboro en diversaj projektoj, ktp.

Kaj ne forgesu: mi volas aŭdi ankaŭ *viajn* demandojn, proponojn aŭ eĉ plendojn por la estraro — ĉu en Esperanto aŭ en la angla. Sendu mesaĝojn por nia *leterkesto* al la redakcio.

— *La redaktoro*

Julie SPICKLER, Vicprezidanto

Post la Landa Kongreso, mi ĉeestis la Paralelan Universan kunvenon en Sanfrancisko en Aŭgusto, gviditan de Orlando RAOLA – ĉirkaŭ 30 personoj partoprenis, el kiuj preskaŭ duono estis “novuloj”. Mi ankaŭ partoprenis la monatajn kunvenojn de mia loka klubo SFERO kaj la semajnaj kunvenojn de la kurso ĉe Stanford gvidata de Trio (Ed WILLIGER, nia UEA-Ĉefdeligito), kaj alportis

Esperantisto

Ĉu plaĉas al vi legi librojn en (aŭ pri) Esperanto? Vi ne estas sola! Legemuloj en Esperantujo feliĉe havas fortunon elekti inter riĉa abundo da libroj, sed tiu abundo povas ankaŭ konsterni: mankas tempo legi ĉion, do kiel scii, kiuj libroj estas vere legindaj, kaj kiuj ne?



Se vi lastatempe legis libron en aŭ pri Esperanto, bonvolu dividi kun ni viajn impresojn. *Usona Esperantisto* bonvenigas viajn recenzojn, ĉu laŭdajn, ĉu kritikajn!

hejmbakitajn kuketojn por la kursmeza paŭzo. Mi ankaŭ sendis dankmesaĝojn al ĉiuj, kiuj donacis al la fondusoj de E-USA.



Ĉi-numere ne sendis raportojn:

- George BAKER, Kasisto
- Jarlo BILLS, Direktoro
- Charlotte BURTON, Direktoro
- Jessica GRASSO, Direktoro
- Angela HARLOW, Direktoro
- Lucy HARMON, Direktoro
- Chris NELSON, Sekretario
- Andrew ROSENBAUM, Direktoro

Media hits

- Many thanks to Paul Perez for mentioning a letter from Hanna Zamenhof-Zaruski [<https://goo.gl/XTBXoF>] in the Dec. 19th issue of *The New Yorker*, where she responds to the magazine's recent review of Esther Schor's book *Bridge of Words*:

I was delighted by Joan Acocella's review. [...] As the oldest great-granddaughter of Ludovik Zamenhof, the inventor of the language, I may be biased, but I believe that his ideas are as fresh today as when they were first expressed, with the power to make the world more peaceful. Although English is now the *lingvo internacia*, the world still desperately needs an *interna ideo*—a unifying idea of humanity. In 1906, Zamenhof printed a pamphlet titled "Homaranismo," which explains the ideals behind Esperanto: "Homaranismo is a teaching which, without tearing a man away from his natural fatherland, language, or religion, will enable him to avoid falsehood and contradiction in his national and religious principles, and put him into communication with men of any language or religion upon a neutral basis, on principles of mutual brotherhood." If Esperanto were more widely used, it would create more openness, acceptance, and civility. Imagine if we could all simply agree that we are

homaranoj—members of humankind.

Paul notes that Zamenhof-Zaruski's letter appears adjacent to an advertisement for *Movado* watches. Coincidence?

- And positive reviews continue to appear in mainstream media for *Bridge of Words*. The latest is from the Dec. 20th issue of the *Chicago Tribune*, titled *Esther Schor blends memoir and history in 'Bridge of Words,' the story of Esperanto* [<https://goo.gl/PvHkXy>]. Here's an excerpt:

Schor's travels take her everywhere from Ho Chi Minh's tomb to an Esperanto-speaking sanctuary for abandoned children in rural Brazil. Despite the obstacles the language has encountered, and the surprising amount of acrimony it has stirred, Esperanto is still with us.

"Esperanto culture," Schor notes in a passage about centennial celebrations of Zamenhof's creation, "was more than a cradle for an infant language, and more than a platform for utopian ideals; ... it had flowered into a distinct tradition and a source of a shared supranatural identity."

"Bridge of Words" takes you inside that identity — which turns out to be, in all its hopes and permutations and divisions, a reflection of the world at large.

Zamenhofa festo en Fort Worth

FORT WORTH, TEKSASO – La 10-an de Decembro, 16 homoj kunvenis ĉe la domo de Filipo kaj Elizabeto DORCAS por festi Zamenhoftagon.



Dorothy, Dylan, Noah, Hope, Rhanda, Jarlo, Elizabeto, Filipo, Susan, Fred, Karolino, Steĉo, Timoteo, kaj Ron.
(Ne en la foto: Alex kaj Jennifer.)

Alex venis de Hjustono; kaj Timoteo venis de Oklahomurbo, Oklahomo. Ĉiuj kunportis diversajn manĝaĵojn por dividi kun aliaj.

La ĉefa temo de la festo estis amikeco, kaj estis multe da konversacio inter la partoprenantoj. Ni kunvenis je la kvara ptm, kaj ni komencis manĝi je la sesa. Filipo estris la preĝadon, menciante la esperojn de la esperantistaro kaj la fakton, ke la deka de Decembro estas ankaŭ la Internacia Tago de Homaj Rajtoj. Estis interese ke la satiga manĝaĵaro estis vegana pro tio, ke kelkaj el la ĉeestantoj manĝas nek viandon nek glutenon.

La dekoracio de la Dorcas-hejmo estis bele Esperanta. Estis verdaj tablotukoj kun malgrandaj Esperantaj flagoj. Ili ankaŭ havis speciale bakitan sen-glutenan kukon kun Esperanto-flago supre kaj biskvitaj figuretoj de diverslandaj infanoj ĉirkaŭe. [Vidu foton sur la kovrilo. –Red.]

Timoteo parolis pri siaj esperoj pri Esperanto, por Oklahomurbo, kaj por Oklahomo. Ni ĉiuj esperas, ke Esperanto fortiĝu en Oklahomurbo kaj en la regionaj urboj en la ŝtato. Teksasanoj certe volas helpi. Alekso venis de Hjustono, Teksaso. Li diris, ke estas aliaj esperantistoj en la regiono sed ili ne kutimas kunveni. Tio estas pripensinda problemo en urboj kun tiel grandaj areoj kiel Hjustono.

Ni finis la eventon kun kantado kaj pli da diskutado. Rhanda ludis la pianon dum ni kantis. Nature la fina

kanto estis la Esperanta Himno.

– Fred MEYER, III
<f3meyer@texoma.net>

Internacia Festivalo en Raleigh, Norda Karolino

CARBORRO, NORDA KAROLINO – Malgraŭ la fakto ke Raleigh estas nun unu el la koroj de la Esperanto-movado en Usono, la plejparto de la loĝantoj ne scias tion. Unu el la metodoj por havigi la novaĵojn estas trovi indan, multkoloran eventon en la urbo.



Gastigado ĉe budo de la Internacia Festivalo en Raleigh, Norda Karolino.

Nia loka “Internacia Festivalo” havas tridek unu jarojn kaj kutime vizitas ĝin tri mil partoprenantoj. La manĝaĵoj kaj amuzaĵoj estas ĉiam bonegaj. Dum tri tagoj, ses el la membroj de ESTRĪ (Esperanto Society of the Triangle/Esperanto-Societo de la Triangulo) disdonis cent kvindek broŝurojn, kolektis multajn subskribojn por nia listo de “interesitoj”, kaj kunparolis kun multaj homoj. Ni dekoraciis nian budon per standardo, lernmaterialoj, kaj du ekranoj kiuj montris filmetojn en Esperanto.

Eble estus pli bone se ni havus pli kremajn ilojn de engaĝado, sed tamen ni trovis tiujn homojn, kiuj havis aŭ tre malgrandan aŭ nenian scion pri Esperanto, kiuj havis malbonan sperton pri Esperanto pasintece, kaj kiuj volas lerni aŭ uzi la lingvon. Se oni estas preta kaj amika al ĉiuj, mi pensas ke oni povas igi ĉiujn tiujn interagojn

pozitivaj. Cetere, se oni miksiĝas libere en evento, portante esperantaĵojn, oni renkontos eĉ pli multe da homoj.

Entute ĝi estis bonega evento, kaj ni jam planas fari ĝin denove. Pli da fotoj pri la festivalo troviĝas en

la amatora lignaĵisto


Lud-krokodilo

Daĉjo RUTAN

Dum iom da tempo, mi pripensis fari ĉi tiun ludilon. Unu tagon inter aliaj projektoj, mi simple diris al mi, “Kial mi ne faru ĝin nun?”

Mi serĉis interrete bildojn de multaj similaj ludiloj por preni ideon, sed finfine ĉi tiun mi desegnis propramane el mia cerbo. Mi uzis tabulon el pinligno por la korpo kaj radoj, kaj du mallongajn pecojn de ligna stango. La tabulo por la korpo havis mezuron ĉirkaŭ 4" × 10" × 3/4" (10 × 25 × 2 cm).

Unue, mi desegnis ŝablonon sur papero. Mi celis, ke la besto aspektu feliĉa ĉar ĝi estas por juna infano:



Ŝablono, tabulo, kaj faldmezurilo.

Mi fiksis la ŝablonon al la tabulo per ŝprucgluo. Sekve mi segis ĝin per elektra arabesko-segilo:

nia paĝo en Facebook [<http://facebook.com/EsperantoNorthCarolina>].

— *Abraham PALMER*
<abraham@boxturtlebakery.com>



Mi zorge segas la kurbitan formon de la krokodilo.

Artmetiistaj butikoj sendube vendas radojn de konvena mezuro, sed mi kreis miajn kvar radojn per kloŝsegilo kaj bormaŝino. Mi boris ankaŭ truojn en la korpo por radaksoj, naztruo, kaj okulo:



Per bormaŝino kaj kloŝsegilo oni povas facile fari radojn.

Sekvis multe da ŝlifado. La randoj de la korpo devis esti malakrigitaj, same al la radoj:



Ŝlifmaŝino malakrigas la randojn de krokodilo kaj radoj.

Ankaŭ *laŭprofila segilo*. Utila por tranĉi kurbojn.

bormaŝino



Borilo muntita sur stablo.

Por la fina muntado, la aksoj estis fiksitaj en la radoj per gluo. Ĉiu akso ankaŭ devis pasi tra truon en la korpo. Mi ne finpretigis la ludilon por ke ĝi estu ege sekura por juna infano. Oni povus ankaŭ farbi ĝin por doni koloron.

kloŝsegilo



Por fari rondajn truojn aŭ diskojn per borilo.



La finfarita krokodilo, preta por ruliĝi.

ŝlifpapero / sablopapero



[Fotoj de la glosaro danke al Lowes [<http://lowes.com>]
—Red.]

La rezulto plaĉas al mi. Nu, se mi nur havus parencon, kiu konvene aĝus por tia ludilo...

Bild-glosaro

arabesko-segilo



Daĉjo RUTAN

Daĉjo estas amatora lignaĵisto en nord-okcidenta Nov-Jerzejo. Per malmultekostaj iloj li faras malgrandajn projektojn por si, por sia familio kaj, de tempo al tempo, por aliuloj.

La sindefenda pafinto

Daĉjo RUTAN & Hoss FIROOZNA

Jen la unua el nova serio de krimenigmoj, adaptitaj el la anglalingvaj verkoj de Donald J. SOBOL – kreinto de interalie la juna detektivo *Encyclopedia Brown*. Leganto Daĉjo RUTAN iniciatis la projekton; mi nur helpis adapti kelkajn detalojn en tiu ĉi unua rakonto. — Red.

Profesoro Ŝiboleto eniris la trinkejon kaj salutis la detektivon.

“Dankon pro via respondo al mia voko,” respondis la detektivo al la fama krimsolvanto. “Jen nia enigmo.”



Surplanke kuŝis la kadavro de Jozeĉjo Cikatro, fifama gangstero. Sur la sanganta kapo de Jozeĉjo troviĝis du novaj truoj: enirvundo ĝuste malantaŭ lia maldekstra orelo, kaj elirvundo antaŭ la dekstra.

En la trinkejo estis ankaŭ tavernisto kaj unu kliento, kiu nerveze fingrumis pistolon. Tiu estis Bernĉjo la Uro – alia gangstero, kaj kontraŭulo de Jozeĉjo. Laŭdire, la du viroj estis malamikoj.

Post mallonga serĉo, Ŝiboleto trovis la pafitan kuglon; ĝi fiksiĝis en lignan pilastron malantaŭ la vendotablo, kaj ne surprize, ĝi konformis perfekte al la pafilo de Bernĉjo.

Bernĉjo senhonte konfirmis, ke li estas la pafinto.

“Mi estis la sola kliento en la trinkejo”, li diris.
“Jozeĉjo eniris kaj tuj komencis laŭte krii kaj sakri al mi.”

“Nu, sakroj ne sufiĉas por pravigi pafadon.”
respondis Ŝiboleto.

“Jes, kompreneble...” rapide diris Bernĉjo. “Kaj mi nur respondis al li sammaniere. Sed tio tute frenezigis lin! Li eltiris tranĉilon kaj svingis ĝin, kurante rekte al mi. Mi devis pafi por defendi min.”

La kadavro de Jozeĉjo ankoraŭ tenis la tranĉilon en sia mano.

“Mi pafis nur por haltigi lin,” diris Bernĉjo. “Mi ne havis elekton!”

La sola atestanto estis la tavernisto – alia suspektindulo. Li konfirmis ĝuste tion, kion diris Bernĉjo.

Ŝiboleto ridetis kaj diris: “Ho, vi knaboj devus elpensi pli konvinkan rakonton ol tio! Nu, vi havos iom da tempo survoje al la arestejo.”

Kiel Ŝiboleto sciis, ke Bernĉjo kaj la tavernisto mensogis? Ĉu vi povas diveni? Inter la solvintoj ni lotumos du premiojn. Bonvolu sendi **nur unu** solvon al la redakcio **antaŭ la 15-a de Februaro**.

Festaj kant(aĉ)oj

Simono KEITH & Lee MILLER

Membro Simono KEITH sendis al ni tekston de lastatempa socireta konversacio kun membro Lee (Liĉjo) MILLER. Liĉjo komencis per afiŝo de la sezona festokanto *Baldaŭ mortos jaro nuna / Super ni ileks-girlandoj*, elangligita fare de la fama brita esperantisto Montagu C. BUTLER. (Angle, la kanto nomiĝas *Fast away the old year passes + Deck the Halls.*)

Jen ĝi, por via legoprezuro. Por koncizigi ĝin iomete, mi forigis la ade ripetitan frazon *Fa la la la la, la...* el ĉiuj strofoj post la unua. –Red.

*Baldaŭ mortos jaro nuna
Fa la la la la, la la la la,
Morgaŭ venos nova, juna;
Fa la la la la, la la la la,
Ni renkontu ĝin sen ploro —
Fa la la, la la la, la la la,
For mizero, for doloro!
Fa la la la la, la la la la!*

*Eble ĝojo kune venos,
Eble multo nin ĉagrenos;
Tamen kun espera koro
Ni salutu ĝin en ĥoro:*

*Timo pri la estonteco
Estas pura malsaĝeco;
Ĉiu do senzorga estu.
Novan jaron gaje festu.*

*Super ni ileks-girlandoj
Gaje pendas kun rubandoj,
Ĉar ĉeestas jaran feston*

Ni, portante belan veston...

*Ĉe l' kamen' kraketas ŝtipoj
Sub la visk' jen kune lipoj!
Nun amatojn ni revidas,
Dancas do, kaj gaje ridas.*

*Jen la temp' por gejunuloj!
Inter ilin do, kunuloj,
Ĉar la jar' rapide pasas
Kaj vin pli maljunaj lasas.*

La petolema Simono ne povis rezisti aldonon de la jena strofo:

*Aĥ! Surhavas Lee sveteron.
Fa la la la la, la la la la!
Ĉu li portas puloveron?
Fa la la la la, la la la la!
Ni ĝin nomu "aĉa vesto"!
Fa la la, la la la, la la la!
Sekvas malapropa gesto.
Fa la la la la, la la la la!*

Kaj Lee finfine respondis:

*Mi fieras pri la vesto
Fa la la la la, la la la la.
Portos ĝin al jula festo.
Fa la la la la, la la la la.
Mi prifajfas ĉian modon,
Fa la la la la, la la la la.
Tial verkis mi ĉi odon,
Fa la la la la, la la la la.*

Usona Esperantisto

Redaktoro / Editor: HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Usona Esperantisto estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo *cc-by-sa* [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eu>]. Kiel komplezon, ni cetere petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj la redakciajn konvenciojn.



Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike (cc-by-sa) license [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>]. As a courtesy, we ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and our style manual.

Kalendaro

Usona Esperantisto aperas ses fojojn jare, do ĉiu numero traktas dumonatan periodon. Dum tiu periodo ni elektronike aperigas kontribuojn laŭeble. Fine de la periodo ni kolektas la artikolojn en PDF-dosiero, kiun ni poste sendas al membroj elektronike aŭ papere.

Limdato estas la absolute lasta tago por kontribui al la tiuperioda bulteno. Do ni petas, ke vi **ne atendu ĝis la limdato por kontribui**, sed sendu viajn kontribuojn kiel eble plej frue.

Numero 1 (jan-feb)

- Limdato por kontribuoj: **15 Februaro**
- Prespreta: 1 Marto.

Numero 2 (mar-apr)

- Limdato por kontribuoj: **15 Aprilo**
- Prespreta: 1 Majo.

Numero 3 (maj-jun)

- Limdato por kontribuoj: **15 Junio**
- Prespreta: 1 Julio.

Numero 4 (jul-aŭg)

- Limdato por kontribuoj: **15 Aŭgusto**
- Prespreta: 1 Septembro.

Numero 5 (sep-okt)

- Limdato por kontribuoj: **15 Oktobro**
- Prespreta: 1 Novembro.

Numero 6 (nov-dec)

- Limdato por kontribuoj: **15 Decembro**
- Prespreta: 1 Januaro.